

Invitilo al programo de Esperantista klubo Brno

Ni kore invitas vin al sekva programo de Esperantista klubo Brno

Temo

Praga printempo kaj soveta okupacio en la jaro 1968 per miaj okuloj

Gvidos: Milan Kolka

En decembro 1967 fariĝis estro de Ĉeĥoslovaka komunista partio Alexander Dubček. Printempe 1968 komenciĝis kelkaj reformoj de ĉeĥoslovaka komunisma reĝimo. Denove estis permesita “libero de vorto”, t.e. malaperis cenzuro, la ekonomio malfermis al libera merkato, denove estis permesitaj malgrandaj privataj entreprenoj.

Tiuj ĉi reformoj iĝis tre rapide kaj Soveta Unio, tiam gvidata de Leonid Breĵnjev, konsideris tion kiel minaco por socialisma bloko. Tial la 21-an de aŭgusto 1968 Soveta armeo kun aliaj armeoj de Varsovia Traktato eniris Ĉeĥoslovakion. Subita okupado de nia lando dum somera feriumado kaptis la loĝantaron tute nepreparitan.

Pri gravaj okazaĵoj el tiu tempo ni povas nun legi aŭ aŭdi en multaj informmedioj. Sed kia estis vivo de “ordinaraj” homoj en tiu tempo? Venu kaj rakontu, kiel vi spertis pragan printempon kaj sovetan okupacion en la jaro 1968. Ne gravas, ke vi tiam estis ankoraŭ infano.

La diskuto estos registrata kaj aperos en Jutubo. Mi petas vin, ke vi diru nur tion, kion vi volas publikigi.

Pri “normaligado”, kiu komenciĝis post okupacio, ni parolos en aparta diskuto novembre.

Lingvo: Esperanto

Kiam: la 12-an de oktobro 2021 je la 18-a h.

Kie: Rete, per Skajpo. Ligilon mi sendos marde.



Programo en Oktobro 2021

La 19-an Ludoj, Občanský klub, Hybešova 65a

La 26-an Kodaj nomoj (vortludo), rete

Mi petas vin, ke vi proponu programon por Novembro



Ni rekomendas

- En Jutubo aperis nova [kanalo de Esperanto-klubo Prago](#)
- [Opero Sternenhoch en Nacia teatro en Prago](#). La operon komponis Ivan Acher. Ĝi estas kantata en Esperanto. Tradukis Miroslav Malovec. La opero estos prezentata la 20-an kaj la 31-an de Oktobro, la 30-an de Novembro, la 15-an kaj la 16-an de Decembro 2021.
- La 9-17-an de Julio, 2022 **56-aj tradiciaj Baltiaj Esperanto-Tagoj**, KLAIPĖDA, Litovio
- La 16-an – 18-an de Septembro 2022 **Kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio**, Pardubice

Pozvánky Vám chodí, protože jste členy klubu nebo příznivci, kteří souhlasili se zasíláním pozvánek. Souhlas můžete kdykoliv odvolat, stačí to napsat v odpovědi na tento e-mail.

Program klubu můžete též zjistit:

- na našich webových stránkách (<https://www.esperantobrna.cz/index.php/eo/aprogramo>),
- na naší stránce na Facebooku (<https://www.facebook.com/esperantobrna/>)
- a na Eventa servo (https://eventaservo.org/o/EO_Brna)